

Karmo kaj Renaskiĝo

Pajasi-Suto (Digha Nikajo 23)

パーヤーンシ経

tradukis **Geo Yoxon**, Britio

Okazis, kelkan tempon post la forpaso de Budho, ke la respektinda Kasapo iradis de loko al loko en Kosalo, kun granda akompanantaro de sanghanoj, kaj alvenis al la urbo Setavijo. En tiu urbo loĝis urbestrarano nomata Pajasio, kiu arogis disvastigi sian opinion, ke ne ekzistas alia vivo krom la nuna, ke estas nenia mondo krom ĉi tiu, kaj ne ekzistas semado nek rikolto de bonaj kaj malbonaj agoj.

La respektinda Kasapo haltis ĉe la arbaro norde de la urbo, kaj portempe ekloĝis tie, kaj multaj urbanoj eliris el la urbo laŭ la Norda Pordego por viziti lin kaj auŝskulti liajn predikojn. Eksciante pri tio, Pajasio ankaŭ decidis iri, ĉar "tiu ĉi knabo¹ Kasapo", li diris, "varbos tiujn ĉi naivajn kaj sensaĝajn honojn al siaj opinioj, se mi ne rapidos deteni ilin per vorto mia."

Do, kiam li alvenis ĉe la bosko, kie estis Kasapo, kaj interŝanĝis kun li salutojn, Pajasio deklaris siajn opiniojn.

"Mi neniam aŭdis ĝis nun," diris Kasapo, "la opinion, ke ne ekzistas alia vivo aŭ mondo krom ĉi tiu, nek ia frukto aŭ rezulto de bonaj aŭ malbonaj agoj post ĉi tiu vivo. Ĉu vi havas pruvojn por montri, ke ili ne ekzistas?"

"Jes, tion mi havas", diris Pajasio. "Mi iam havis amikojn kaj parencojn, kiuj vivadis malvirte, mortigante, ŝtelante, mensogante, kaj ĉiel agante malbone, kaj mi havis aliajn amikojn kaj parencojn, kiuj vivadis virte, evitante ĉiujn malbonecojn tiajn. Kiam mi sciis, ke ili estis mortantaj, mi petis ilin, ke ili revenu al mi kaj sciigu min, post sia morto, pri sia alveno en infero aŭ paradizo laŭ siaj apartaj meritoj; sed kvankam ili promesis tion fari, ili nek venis mem, nek sendis mesaĝon."

"Nu, moŝto", respondis Kasapo, "mi faras demandon al vi. Se oni kaptis krimulon je la faro, kaj jure kondamnis lin, ke liaj brakoj estu ligitaj, li estu pelata tra la stratoj de la urbo kaj el la Suda Pordego al ekzekutejo por tie suferi dehakon de la kapo; se tiu ĉi

¹ Kiam Kasapo aniĝis al la disĉiploj de Budho, jam antaŭ multaj jaroj, li koniĝis per la kromnomo 'knabo', pro lia tiama juneco, kaj per ĝi li ankoraŭ nomiĝis ŝercete.

viro petus prokrastigon de la ekzekuto dum li vizitu siajn amikojn kaj parencojn, ĉu vi opinias, ke la permeso estus konsentita? Aŭ aliflanke, se homo falis en kotaĉan ŝlimejon ĝis super sia kapo, kaj vi ordonis, ke oni eltiru lin, banu lin tutpure kaj revestu lin en senmakulaj vestaĵoj, kaj konduku lin al via palaco por tie regali lin je lia plej granda plezuro, ĉu vi opinias, ke tiu homo volus reiri al tiu feĉaĉa, odoraĉa, abomena malalloga ŝlimejo?"

Pajasio ne povis nei ambaŭ supozajojn.

"Nu, se tiu ĉi krimulo, kiu estas homa, ne povis ricevi la permeson de siaj ekzekutistoj, ankaŭ homaj, kiel probabla estus tio, ke viaj amikoj ricevus permeson de la diabloj de infero? Aliflanke: la homa vivo estas kiel abomena ŝlimejo kompare kun la paradizaj mondoj. Kaj plue: tiuj ĉi aliaj mondoj ne estas fizikaj, videblaj per la okuloj de tiu ĉi korpo. Ili estas statoj spiritecaj. Ke oni dirus, ke ili ne ekzistas, estas tiel same tiel tio, ke homo blinda ekde la naskiĝo, kiu tute ne povus scii, kiel aspektas lumo aŭ mallumo, bluo, flavo, ruĝo aŭ bruno, nek luno, nek suno, dirus, ke tiaj aferoj ne ekzistas."

"Tamen", kontestis Pajasio, "mi vidadis multajn religiemajn personojn, kiuj vivas virte, sed kiuj ankoraŭ tenemas sin al tiu ĉi vivo kaj ne deziras morti. Mi ne aŭdis ilin diri, ke ili estus pli feliĉaj kiel mortintoj. Se tiel estus, ĉu ili ne sin venenus, sin mortpikus, aŭ ĵetus sin de altaj krutegaĵoj?"

"Nu, moŝto", respondis Kasapo, "mi klarigos al vi per similaĵo, ĉar per similaĵo ofte okazas, ke saĝaj personoj povas ekkompreni tion, kio estas dirata. Iam estis viro, kiu havis du edzinojn. La pli aĝa virino jam naskis pro li filon, kiu nun havas aĝon de dek aŭ dek du jaroj; la alia estis unuafoje graveda, atendanta baldaŭan akuŝon. Tiam tiu ĉi viro mortis. La knabo tiam diris al la kunedzino de sia patrino: 'La tuta posedaĵo de mia patro, sinjorino, ĉu greno, ĉu arĝento, ĉu oro, ĉio estas nun la mia. Por vi estas nenio tie ĉi. Ĉio, kion vi havas de mia patro, vi tial donu al mi, sinjorino, ĝi estas mia heredaĵo.' Tiam la pli juna edzino respondis: 'Vi atendu, knabo, ĝis naskiĝos mia infano. Se estas knabo, li dividos ĉion egale kun vi, sed se estas knabino, ŝi servos vin.'"

"Sed la knabo ankoraŭ ripetadis sian pretendon, ĝis la juna edzino trovis tion jam ne elportebla, kaj ŝi prenis glavon, eniris sian privatan ĉambron kaj kriis al si: 'mi eltrovos, ĉu ĝi estas knabo aŭ knabino.' Tion dirante ŝi disfendis sian ventron per la glavo. Tiel ŝi detruis kaj la sian vivon kaj tion de sia infano. Tiel same vi, moŝto, venus al ruiniĝo kaj katastrofo pro via malsaĝa kaj senpripensa esploro pri alia mondo. Homoj piaj kaj virtaj ne provas rapidigi tion, kio ankoraŭ ne estas matura; estantaj saĝaj, ili atendas maturecon. Homoj virtaj bezonas sian nunan vivon, ĉar dum sia vivo ĉi-tie ili agas meritplene, kaj tiom kiom eble agadas por la bono de kiel eble plej multaj personoj, por la felico de multaj, pro kompatato al tiu ĉi mondo."

“Mi ankoraŭ ne konvinkiĝis pri tio, kiel renaskiĝo povas esti,” diris Pajasio. “Ni supozu, ke oni metus krimulon, jam kondamniton al morto, en sufiĉe grandan poton dum li ankoraŭ vivas, kaj oni fermus la aperuturon de la pota per malseka leda kovraĵo sentrue sigelita per cemento, kaj poste metus ĝin sur forte hejtanta fajron. Kiam ni sendube scius, ke la homo nepre estas mortinta, ni zorge malŝtopus la poton tre atente observante ĝin, por ke la animo de la viro ne elvenu nerimarkite de ni. Kompreneble ni ne vidus animon elveni.”

“Aŭ, se ni pesus viron antaŭ ol motigi lin kaj pesus lian korpon tuj poste, ĝi ŝajne estus pli peza en sia senviva stato, anstataŭ pli malpeza pro la foriro de la animo.”

“Se mi senhaŭtigus viron ankoraŭ vian kaj iom post iom dispecigus lin, ĝis li preskaŭ mortus, kaj tiam turnus lin sur lian dorson por se eble rimarki la elpason de lia animo, ni ne vidus la elpason de lia animo malgraŭ tio, ke ni turnus lin dorsen aŭ alien. Nu, mastro Kasapo, ĉu tio ne estas pruvo sufiĉa, ke renaskiĝo ne povas okazi, nek povas okazi venonta fruktiĝo aŭ rezultoj de agoj bone aŭ malbone faritaj?”

“Mi ree klarigos per similaĵo,” respondis Kasapo. “Iam estis muzikisto kiu, prenante sian blovinstrumenton, iris malproksimen ĝis la landlimo. Kiam li alvenis ĉe tre fora vilaĝo, li staris tie, en la mezo de la vilaĝo, kaj ludis dolĉan arion. Je la fino de la ario li sidiĝis tie sur la berbaro kaj metis la instrumenton flanken. Tiam tiuj ĉi foraj loĝantoj, ravitaj de la muziko, demandis lin: ‘De kie venas tiuj sonoj, tiel ĉarmegaj, tiel dolĉaj, allogaj kaj sorĉantaj?’”

“Li montris al ili la muzikinstrumenton. ‘Tio ĉi,’ li diris, ‘kio eligas sonojn tiel dolĉajn, estas nomata trumpeto.’”

“Ili remetis la instrumenton sur la herbaron kaj vokis al ĝi: ‘Sonu, mastro trumpeto, sonu!’ Sed eĉ ne unu sonon faris ĝi. Tial ili kuŝigis ĝin sur ĝian dekstran flankon, kaj jen sur la maldekstran, kaj ili starigis ĝin vertikale kaj, en ĉiu aparta pozicio en kiu ili metis ĝin, ili ĝin petis, ke ĝi sonu la muzikon. Ili inversigis ĝin, turnis ĝin kaj frapis ĝin per la manoj, per bastonoj, per terbuloj, kaj ripetade vokis: ‘Sonu, sonu vi, trumpeto!’”

“Tiam la landlimanoj, pripensante la aferon, diris: ‘Kiam aldoniĝis al la trumpeto homo, homa lerteco, kaj blovo, tiu trumpeto eligis sonojn; sed sen la homo, sen la homa lerteco, kaj sen la blovado, ĝi ne sonas.’”

“Tiel estas, moŝto, kiam la homa korpo kunhavas siajn akompanaĵojn, vivon, aktivecon kaj inteligenton, ĝi venas kaj iras, staras, sidiĝas aŭ kuŝiĝas, ĝi vidas, aŭdas, flaras, gustumas, palpas kaj pensas; sed kiam mankas al ĝi tiuj ĉi akompanaĵoj, ĝi ne povas tion fari.”

Pro tio, ke Pajasio restis ankoraŭ nekonvinkta, Kasapo darigis sia rakontadon:

“Iam estis viro, kiu kultis la fajro-adoradon. Tiu viro adoptis knabon, kiun li trovis forlasita, kiam tiu estis nur eta infano. Okazis, ke unu tagon, kiam la knabo estis dek aŭ dek du jaraĝa, la viro devis fari vojaĝon aliloken pri iu afero. Tiam li diris al la knabo: ‘Mi devas foresti hodiaŭ, knaĉjo mia. Vi atentu la fajron kaj penu, ke ĝi ne estingiĝu. Tamen, se malgarŭ ĉio ĝi stingiĝos, jen estas hakilo, jen brulligno, kaj jen fajrodrilo, tiel ke vi povas ekbruligi ĝin denove!’ Tion dirinte al la knabo, la viro foriris por prizorgi siajn afrojn.”

“La knabo absorbiĝis per sia ludado kaj lasis la fajron, ke ĝi estingigis. Tiam li pripensis la vortojn de sia patro ‘jen estas hakilo, jen brulligno, kaj jen fajrodrilo, per kiuj vi povas ekbruligi ĝin denove, se ĝi estingiĝas.’ Li prenis la hakilon kaj hakis la fajrodrilon en pecojn, en pli ol cent pecojn; li pulvigis ilin kaj ventumis la pulvoron kiel grenon, sed kompreneble ne rezultis fajro.”

“Kiam fine la viro revenis, li diris al la knabo: ‘Aj, infano, vi lasis la fajron stingiĝinta.’”

“‘Jes, patro’, respondis la knabo, ‘la fajro estingiĝis dum mi ludis. Mi pripensis tion, kion vi diris kaj penis por rebruligi ĝin: mi dishakis la fajrodrilon en pecetojn, sed ne rezultis ekbrulo.’”

“‘Kiel malinteligenta, kiel stulta estas la knabo,’ la virol diris al si, ‘ke li penu ekfari fajron en tia sensenca maniero.’ Prenante alian fajrodrilon, dum la knabo lin observis, li diris al li: ‘Jen kiel fari brulon, knaĉjo mia. Oni ne faru tiel, kiel vi tiel sensece kaj malinteligente provis fari.’”

“Tiel same, moŝto, sensece kaj malinteligente vi provis trovi pruvon kontraŭ la ekzisto de alia mondo krom la nuna.”

“Jes”, respondis Pajasio, “efektive mi komprenas la ĝustecon de tio, kion vi diras, sed reĝo Pasenadio de Kosalo kaj multaj aliaj eminentuloj konas min kiel fervoran subtenanton de la teorio, ke ekzistas nenia vivo aŭ alia mondo krom ĉi tiu, kaj ili pensus, ke mi estas ridindulo, se mi nun inversigus mian opinion. Pro la nura memestimo mi devas persisti en mia sintenado.”

“Ankoraŭ aŭskultu, moŝto,” diris Kasapo. “Okazis, ke iam granda karavano el mil veturiloj iris de la orientaj landoj en okcidentan landon. Tiel grandaj estis la bezonoj de tia granda kunveturantaro por furaĝo, akvo kaj brulligno, ke ili eluzis, kie ajn ili iris en tiuj sekaj neproduktemaj regionoj, ĉiun lastan fragmenton de furaĝo kaj ligno, kaj ĉiun lastan guton da akvo. Du karavanestroj gvidis la veturantaron, ĉiu estris duonon de ĝi. Fine ili decidis inter si, ke ili disdividu la karavanon. Unu duono, gvidate de unu estro, antaŭeniru kun rezervaj provizaĵoj, kaj la alia duono atendu sufiĉe longe por lasi la trapasantan landon, ke ĝi restatiĝu post la postuloj de la unua trairanta aro.”

“Tiel oni aranĝis, kaj la unua duono ekiris. En la dua aŭ tria tago de marŝado ili renkontis viron, kiu veturis en ĉaro en la direkto kontraŭa al ilia. Lia hararo kaj vestaĵo estis malsekaj kaj lia ĉaro plenŝprucita de koto. Ili ricevis informon de tiu ĉi viro, kiu diris, ke li venis rekte de la loko, kiu estas la celo de ilia vojaĝo, ke falis multe da pluvo en la lando traveturita de li, kaj sekve troviĝas tie abunda akvo kaj vegetaĵoj. ‘Forĵetu viajn rezervajn provizaĵojn,’ diris la viro, ‘vi tute ne bezonos ilin, kaj vi tiel veturos des pli rapide pro la portado de malpli grandaj ŝarĝoj, kaj des pli frue vi atingos vian vojaĝfinon.’”

“La estro de la karavano agis laŭ tiu ĉi konsilo kaj rapidis antaŭen. Sed dum la unua tago, kaj tra tute la dua tago, la tria tago, la kvara, kvina, sesa, kaj sepa tagoj, kaj dum ĉiuj sekvantaj tagoj ili ne venis al eĉ signo de herboj, ligno aŭ akvo, kaj fine la tuta karavano, kaj homoj kaj bestoj, pereis.”

“Kiam la dua karavanestro opiniis, ke pasis sufiĉe da tempo de kiam la unua vojaĝantaro foriris, li havigis al sia kompanio rezervajn provizojn da furaĝo, akvo kaj ligno, kaj ekiris. Li ankaŭ renkontis la viron, kiu verturis en ĉaro, kiu raportis sammaniere kaj konsilis, ke ili forĵetu la provizaĵojn.”

“Tiam la estro diris al la veturigistoj: ‘tiu ĉi viro diras, ke antaŭ ni la lando estas bone akvumita kun abunda akvo kaj vegetaĵoj, tiel ke ne necesas, ke ni nin ŝarĝu per niaj rezervaĵoj, kaj ni forĵetu ilin, por ke ni veturu senĝene; sed tiu ĉi viro ne estas amiko nia, nek parenco de iu el ni; kial, do, ni fidu al lia diro? Ni daŭrigu la vojaĝon tiel, kiel ni jam faris, portante la provizaĵojn kun ni.’”

“Tiel ili faris; kaj dum la irado de sep tagoj ili ne venis al signo de akvo aŭ vegetaĵoj, sed fine ili venis al la kadavroj de la homoj kaj bestoj de la unua karavano, kiuj pereis pro manko de provizaĵoj. Ili ŝarĝis siajn bestojn per la plej valoraj komercaĵoj el la unua karavano, forĵetis la malpli valorajn el la sia, kaj ree antaŭeniris al la fino de sia vojaĝo.”

“Tiel same vi, moŝto, sensaĝe kaj neinteligente venos al ruiniĝo pro tio, ke vi, simile al la unua karavanestro, fantazie kredas ion ajn, kion vi aŭdas, kaj sensece serĉas pruvon pri la ekzisto de alia mondo krom ĉi tiu.”

“Vi similas unu porkpaŝtiston, kiu pensis, kiam li vidis amason da forĵetita malpuraĵo, ke ĝi taŭgos kiel manĝaĵo por siaj porkoj. Li sternis sian mantelon kaj kolektis la malpuraĵon en ĝi, kunligis ĝin kiel pakaĵon, kaj portis ĝin sur la ŝultro. Sed li kaptiĝis en neatendita pluvego, tiel ke la pakaĵo malsekiĝis ĝis saturiĝo kaj la malpuraĵo tragutis el ĝi kaj ŝlime kovris la viron eĉ ĝis la pintoj de la fingroj. La preterpasantoj diris inter si: ‘jen, kia malsaĝulo, kiu persistas portadi tiun ŝarĝon da malpuraĵo.’”

“Aŭ vi similas kubludanton, kiu lertis kaŝe engluti ĵetkubon, kiam ĝia falo ne favoras lin. Sed lia kontraŭulo ekrimarkis la ruzon kaj sekrete ŝmiris la kubon per veneno. Ve al la trompinto, kiam li ĝin englutos.”

“Mi rakontu al vi pri du amikoj, kiuj dum sia irado kuna trovis forlasitan kvanton da kruda kanabo. Ili ambaŭ plenigis sakon per ĝi kaj daŭrigis la hejmeniron. Survoje ili trovis kvanton da kanabaj fadenoj ŝpinitaj. Unu viro elĵetis la krudan kanabon el sia sako kaj plenigis ĝin per la fadenoj. Sed la alia diris, ke li tiel nete jam ligis sian sakon, ke li ne volas disordigi ĝin por fari la ŝanĝon, kaj plueniradis ankoraŭ portante la krudan materialon. Post iame ili trovis kvanton da kanaba teksaĵo kaj la unua viro inteŝanĝis siajn fadenojn per la jam teksitaj ŝtofoj, dum la dua viro ree decidis ne fuŝi la bonordon de sia sako, tiel zorge kunligita, kaj daŭre portis la originalan ŝarĝon. Nu, sur la hejmenira vojo ili venis al diversaj lokoj laŭvice, kie ili trovis sinsekve pli bonajn teksaĵojn en tolo, poste el silko, tiam el arĝento kaj fine el oro. Ĉiufoje la unua viro interŝanĝis sian malpli valoran ŝarĝon per pli valora, sed la alia viro tenis tion, kion li jam havis. Kiam fine ili alvenis ĉe la hejmo, unu viro havis pakaĵon da oro, dum ke la alia havis tre bone kunligitan pakaĵon da kruda kanabo.”

“Kaj vi, moŝto, tenante tro obstine al viaj malnovaj opinioj, similas al la viro kun la ŝarĝo de kruda kanabo.:

“Mastro Kasapo”, diris Pajasio, “mi revigas de viaj similaĵoj kaj feliĉe malkonfesas miajn estintajn opiniojn.”